MONDA ESPERANTA

LIGO por SPORTO

Danke al iniciato de bulgara s-aino Klarita Velikova, dimanĉon (la 25-an de julio 2004, je la 14:45 h.) dum la 89-a UK en Pekino, en la salono Chen Ĝi okazis faka kunveno por fondo de MONDA ESPERANTA LIGO POR SPORTO (MELS).

La ĉefaj **celoj de MELS** estas:
1) Disvastigo de Esperanto inter la praktikantoj kaj ŝatantoj de sportoj kaj batalartoj;
2) Popularigo de sportoj kaj batalartoj pere de Esperanto.



En la kunsido partoprenis ĉirkaŭ 40 ŝatantoj kaj praktikantoj de pluraj sportoj kaj batalartoj.
Estis elektitaj du estraranoj de la Ligo:
Prezidanto: Klarita Velikova, klinika psikologo en Anglio.
Korea tradicia Tekkjon - 3-a Dan, Hosinsul - 3-a Dan (Korea sindefenarto), Ĵudo, Kumdo, Kukkung (Korea tradicia arkpafado)
retadreso: metalakva(a)gmail.com , senfine(a)yahoo.com
Skajpo-kromnomo: metalakva
Sekretario: Jurgen Kloker, policisto en Germanio
Allkampf-ĵicuo - 2-a Dan, Ĵu-ĵicuo - 1-a Dan, Tekwondo - 2-a Dan
retadreso: jkloker(a)yahoo.de

Ne tre longe post la fondiĝo la membraro multe kreskis, kaj en 2010 atingis la nombron 128 .